14



Landoj

*****

Countries

LANDOJ	
Alĝerio	Algeria
Belgio	Belgium
Brazilo	Brazil
Britio	Britain
Francio	France
Hungario	Hungary
Japanio	Japan
Svedio	Sweden

ferias	am/is/are on holiday
skribas	am/is/are writing
brilas	am/is/are shining
sendas	am/is/are sending

kara	dear
nomo	name
adreso	address
suno	sun
kastelo	castle
al	to

jaro	year
personoj	people
knabo	boy
knabino	girl
poþtkarto	postcard
via	your

☆-☆

SKRIBU POŜTKARTON!

Jen bela poŝtkarto! Arturo sendas ĝin al amiko, kiu loĝas en Hungario.

Kara amiko!

Saluton!
Mi ferias ĉe la domo de mia avino.
Ŝi loĝas apud malnova kastelo.
Mi helpas ŝin en la ĝardeno.
Ŝiaj floroj estas tre belaj.
Ŝi havas hundidon, tre malgrandan, kun kiu mi ludas.
La suno brilas!

Via amiko,
Arturo

Istvan Lukacs
Tekla u. 91,
HU-1155 Budapest
Hungario



B r a z i l o　　_ _ _ _ _ _　　_ _ _ _ _ _ _ _　　_ _ _ _ _ _

_ _ _ _ _ _ _　　_ _ _ _ _ _ _ _　　_ _ _ _ _ _　　_ _ _ _ _ _ _ _



Kiuj landoj?

Kiu vi estas?

Fill in your name and cross out the words which do not apply to you.

① Mia nomo estas .....

② Mi estas knabo / knabino.

③ Mi havas ses / sep / ok / naŭ / dek / dek+ jarojn kaj mi loĝas en Britio.

④ En mia familio estas du / tri / kvar / kvin / ses / sep personoj.

⑤ Mi havas unu / du / tri / kvar / kvin / ses fratojn.
Mi havas unu / du / tri / kvar / kvin / ses fratinojn.
Mi ne havas fraton aŭ fratinon.

⑥ Mi havas hundon / katon / kuniklon / testudon / fiŝon.
Ĝi estas malgranda / mezgranda / granda kaj bruna / flava / oranĝa / ruĝa / blua / verda / nigra / blanka.

⑦ Mi estas malgranda / mezgranda / granda kaj
miaj okuloj estas bluaj / verdaj / brunaj / nigraj.

⑧ Ni loĝas en nova / malnova / alta / malalta domo kun ĝardeno.